Lingvistika laboratorio en Milano (Laboratorio linguistico a Milano)

La 25-an de februaro 2018, ĉe la sidejo de la **Milana Klubo**, okazis la Laboratorio pri Esperanto kies celo estas la prezentado de la Internacia Lingvo al neesperantistoj. Temis pri la dua fojo por tiu manifestacio post la unua evento de la 30-a de septembro 2017 kaj ankaŭ ĉi-jare kunlabore kun la Torina E-Centro. La partoprenantoj estis 12, preskaŭ ĉiuj junaj studentoj. Tio konstituas tre bonan sukceson precipe se oni konsideras ke en 2017 ni havis nur unu partoprenanton.

De E-o Torina Centro venis Alberto Vitale kaj Carlotta Pavese kiuj havas grandan sperton pri la organizado de tiaj eventoj ne nur en Torino sed ankaŭ en aliaj urboj. Ĉe nia klubo sam-noj Gianni Conti, Giovanni Daminelli kaj Francesco Fagnani preparis la eventon.
La Laboratorio komencis je la deka horo matene. Vitale priskribis la fundamentojn de la esperanta gramatiko per multaj ekzemploj partoprenigante aktive ĉiujn junulojn kaj ilustris koncize la historion de la esperanta movado. Daminelli informis pri la ĉefaj kursoj de Esperanto kaj Pavese kaj Fagnani parolis pri nia asocia vivo kaj pri la ĉefaj naciaj kaj internaciaj kongresoj aŭ renkontiĝoj.

La junuloj partoprenis kun granda atento kaj intereso. Fakte la plimulto konis nenion pri la internacia lingvo kaj tre miris ke ili povas iomete kompreni la lingvon kaj vortigi simplajn frazojn jam post nur tri horoj da leciono. Krome ĉio disvolviĝis en etoso de granda gajeco kaj amuziĝo.

Do, certe estus bone ripeti tiun ĉi manifestacion ankaŭ la venontan jaron.

(Bruno Marcandalli)